Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.), Tutmonda Esperantista Ligo Fervojista (T. E. L. F.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

1a Jaro. No. 5 **Monata** **Decembro 1924**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualajojn sendu ĝis la 1a de l'monato

Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj kaj Germanoj 30.000 aŭ. K, Alilandanoj 3.50 svis. fr.

Klara Zamenhof

mortis la 6. decembro, estis enterigata la 8. decembro en Warszawa

Ni Aŭstrianoj precipe memorlenos la honorindan kaj amindan edzinon de nia kara Majstro, ĉar ŝi partoprenis lastfoje Esperantan Kongreson en Wien

Koregajn dezirojn okaze Kristnaska festo kaj novjaro! **La redakcio.**

MINIATURA „LIGO DE NACIOJ“ EN AMERIKO.

Klubo, kies nomo estas „Intercollegiate Cosmopolitan Club“ kaj kiu konsistas el 700 diverslandaj studentoj el 45 „colleges“, universitatoj kaj pli altaj faklernejoj en aŭ proksime ĉe New York, enloĝigos sin post kelkaj monatoj en sia nova hejmo, kiu kostos tri milionojn da dolaroj.

La ĉefa celo de la tiel impone enhejmigota organizo estas, amikece interrilatigi la diverslandajn studentojn vivantajn en New York.

Inter la klubanoj estas 251 gestudentoj el Azio, 195 el Eŭropo, 182 el Nordameriko, 53 el Sudameriko, 21 el Afriko kaj 10 el Aŭstralio, Nov-Zelando kaj la Pacifikaj Insuloj.

La klubo aranĝas t. n. naciajn vesperojn, dum kiuj la studentoj de unu lando prezentas gastigon kaj amuzon laŭ la maniero de sia hejmlando. Kiom eble la eksterlandaj anoj estas interrilatigataj al amerikaj familioj.

La plej interesa organizo interne en la klubo estas la „Internacia studentkonsilantaro“. Ĝi konsistas el po du delegitoj de la enklubaj nacioj. Ĝi estas la plej ampleksa internacia korporacio. Estas ja en ĝi reprezentataj 70 nacioj, tio estas 16 pli ol en Ligo de Nacioj.

Pro tio oni prave nomis ĝin miniatura mondparlamento.

El „Wiener Mittagszeitung“ (t. e. Wien-a tagmezgazeto) 13. septembro 1924, pĝ. 3.

ESPERANTO EN LA FABRIKO CÄCILIA.

Cäcilia estas nova akcia entrepreno por fabrikado de bonegaj orgenoj, pianoj kaj aliaj muzikiloj, mendataj multnombre en- kaj eksterlande. Ĝi havas fabrikejojn en Salzburg, Parsch kaj Gnigl. Profitante la okazon, ke la direktoro de Cäcilia dungis la sekretariinon de nia grupo, Salzburga Esperantogrupo, ni klopodis interesigi la entreprenon por reklamo pere de Esperanto. Tio bone sukcesis. Ne nur venis demandoj, sed el Hollando revenintaj muntistoj raportis, ke ili estas demanditaj, ĉu ili parolas Esperanton. Kaj unu, kiu riparis orgenon en Engelsberg, malgranda vilaĝo en Karintio, rakontis, ke simpla kamparano lin alparolis kaj diris: „Ĉu ne, vi estas de Cäcilia?“ Li respondis: „Ĉu vi scias ion pri Cäcilia?“ La kamparano tute trankvile rediris: „Ho jes, mi ja legis longan artikolon pri via bonega fabrikejo en nia Esperantogazeto, Katolika Mondo.“ Tiaj faktoj efikis ĉe la direktoro kaj ĉe la laboristaro. La firmo aliĝis al U. E. A. kaj la direktoro invitis fakprofesoron Mathiaschek, el la industria lernejo en Hallein por havi paroladon pri Esperanto en la salonego de la fabriko en Parsch. Fine anoncis sin 40 el la oficistoj, laboristoj kaj lernantoj por partopreni kurson, kiu komencis la 28an de oktobro. Do oni vidas, ke jam estas ĝusta tempo por efike propagandi ĉe industriaj entreprenoj kaj estas tre dankinde, ke ĝusta tempe aperis la 183 paĝa broŝuro: „Internacia Komerca Adresaro Per Esperanto“, eldonita de Asocio por komerco kaj helplingvo tutmondaj en Wien. Estas nepre dezirinde, ke propagandistoj aĉetu ĝin, varbu per ĝi kaj kunhelpu pligrandigi kaj perfektigi ĝin. Entreprenoj dezirantaj eksterlandan klientaron jam baldaŭ per ĝi povos efike reklami.

D-ro F. Christanell,
Parsch-Salzburg.

RADIO ĈE LA ESKIMOJ.

Ankaŭ la Eskimoj konatiĝis kun la miraklo de radiodissendado kaj ili ekkonis en ĝi fortan sorĉon de la blanka viro, kiun li al si servutigis. Sed ankaŭ al la polaresplorantoj, kiuj vivas en la soleco de la eterna glacio prezentas la radio neimagitajn eblojn. Pri la radioĝojoj de la plej alta nordo raportas kapitano Donald Mac Millan, kiu kun sia skuno post dekkvin monata restado en la Arkto revenis al New York: „Neniu tago kaj nokto en ĉi tiu malluma se-

zono de la nordo pasis, je kiu ni ne aŭdis la novaĵojn el tuta mondo. Ni aŭdis la radiostaciojn de Anglujo, Germanujo kaj Hawai. Jes, ni eĉ ekkonis la voĉojn de niaj amikoj. La unutoneco de la polarnokto estis rompita. Radio venkis la tutan mondon. La radioaparato estas la plej valora inventario, kiun la polaresploranto povas kunpreni. Li povas plej precize reguligi la horloĝon. Li estas informata pri la sorto de siaj amikoj kaj de sia lando. La Eskimoj, kiuj kun mi la radiosciigojn aŭdis, ĝin neniam forgesos. La filmo kaj la radio estis por ili sorĉaĵoj. Per hundoglitiloj ili venis el malproksimo da pli ol cent kilometroj por vidi kaj aŭdi la miraklojn."

Laŭ A. Z. esperantigis *R. A. Čech.*

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

PROTOKOLO de la Dua A. E. D.-konferenco en Graz la 7. decembro 1924.

Ĉeestantoj: De la direktantaro: s-roj Bartel, d-ro Halbedl (Graz), d-ro Blaas (Rattenberg), prof-ro Christanell (Salzburg), R. Lidl (Steyr), Schade, Smital (Wien).

Societoj reprezentitaj: Graz (Esp. Soc. por Stirio); Loka grupo Graz-d-ro Biehler, Hallamayer, Mader, Rogler; Loka grupo Leoben-Cerdonio; Korneuburg-Altrichter; Saalfelden-Plainer; Rattenberg-d-ro Blaas; Salzburg-prof-ro Christanell; Knittelfeld-Pawlik; Wien: Akademia E. S.-Čech, Aŭstra Kat. E. L.-Gasparini, Aŭstra Pac. E. L.-Smital, Honys, Bohema Klubo-Čech, Danubio-Čech, Eldona kooperativo- teiner, Fervojista Unio-Pichler, Honys, Fervojista andligo-Steiner, Fideleco-Pichler, Junularo-Altrichter, Komerca Asocio-Schade, Lehrerverein-Smital, Organizo de Esp. Postenhavantoj-Steiner. Altrichter, Polica Esp. Un.-Hirtz, Progreso-Honys, la Esp. Un.-Schade, Vesperto-Pichler, Virina Sekcio-Gaspatini.

Landestroj: Salzburg-prof-ro Christanell; Stirio-Hackl; Tirolio-d-ro Blaas; Wien-Smital.

Malfermo je la 9 40. Malferma saluto de s-ro B a r t e l, kiu anstataŭis la prezidanton de A. E. D. s-ro di-ro Schamanek, kaj proponas s-ron Rogler kiel protokolanton. Tagordo senŝanĝe akceptita.

1. D i r e k t a n t a r a r a p o r t o S-ro S c h a d e alportas la salutojn de la prezidanto Schamanek kaj senkulpigas lian neĉeeston. Li raportas: a) Post la fondo la 6. januaro 1923 estis la unua laboro la forsendo de ĉi-koncerna cirkulero. (Ekfunkciis tuj la landestraroj en Tirolio kaj Wien.) Funkciinte kiel ĝenerala sekretario li raportas pri la laboroj por ekzamena komisiono, konferenco en Venezia, komercaj ĉambroj, Wien-a foiro, invito al la XVIa en Wien, batalo kontraŭ Ido, ekspozicio en Foirpalaco kaj gravaj porkongresaj laboroj, kiuj lastaj precipe neebligis organizajn detalajn laborojn por A.E.D. (Unuanime akceptita.)[1] b) Prezidanto B a r t e l demandas pri farotaj proponoj; anoncas sin Čech, Christanell, Halbedl, Schade, Smital.

2. L a n d e s t r a r a j r a p o r t o j. a) Salzburg (d-ro C h r i s t a n e l l): Landestraro organizita, 5 grupoj amika interrilato vigla postmilita movado. Kursoj ankaŭ ĉe policistaro. b) Tirol (d-ro B l a a s): Ekzistas 4 grupoj. Sukcesa laboro inter ĝendarmoj (skriba instruo) kaj laboristoj. Bona financa sukceso helpe de Arbeiterkammer Innsbruck (2,000.000 kronojn). Vigla Esperanto-Radio-grupo en Rattenberg. La malgrandeco de tiu urbeto, centrejo de Tirol, malhelpas energian tutlandan laboron. c) Steiermark (R o g l e r): 2 grupoj de Esp. Soc. por Stirio en Graz, respektive Leoben, 4 rondoj en Knittelfeld, Kalsdorf, Köflach kaj Voitsberg. Esp.-kursoj en Universitato (prof-ro Hainschegg), katolika seminario (d-ro Halbedl), polica direkcio (Hallamayer), Apolloneum (Eder), klubkurso (Rogler), 4 kursoj en Leoben (prof-ro Sitte kaj Cerdonio), 1 kurso en Kalsdorf. Vigla U. E. A.-movado (ĉefdelegito d-ro Halbedl). Laŭ oficiala enketo de la poŝta direkcio 800 stiriaj poŝtistoj montras intereson por Esperanto. Sensukcesaj intervenoj ĉe Komerca ĉambro kaj Foiro „Grazer Volksblatt" raportis okaze pri Esperanto (sola inter la kvar ĉi-lokaj ĵurnaloj). d) Wien (S m i t a l) prokrastita al posttagmezo. — Pro demando de landestro, ĉu li nur private aŭ oficiale subtenu laboristan Esp.-movadon, propono de d-ro H a l b e d l: Skribe inviti A. L. L. E. al oficiala kunlaboro kun kaj en A. E. D., estas unuanime malakceptita. Sed ·o i akceptas jenan proponon de prof-ro C h r i s t a n e l l: La direktantaro kaj la landestroj en siaj teritorioj zorgu, ke la A. E. D.-movado restu private en amika interrilato kun la fakaj movadoj, kiuj eble ne povas oficiale aparteni al A. E. D.

3. S p e c i a l a j r a p o r t o j. S t e i n e r: a) 2 kursoj (70 lernantoj) de li gvidataj en Bundes-Erziehungsanstalt Traiskirchen (direktoro d-ro Adolf Watzke). Interveno ĉe la koncerna referanto ministr. kons. Scapinelli, kiu aktive subtenas. b) „Aŭstria Esperantisto", fondita en aŭgusto 1924, estas redaktata de li. Ĝia kvara numero enhavanta

[1] Por kaŭzi ĝustan imagon pri la laboroj menciitaj: La aldonoj pri Dir. Rap. al la originala protokolo (ekskluzive kongreslaboroj) ampleksas 31 paĝojn!

artikolon pri Traiskirchen estas forsendita inter alie ankaŭ al 70 oficialuloj-adresoj ricevitaj de min. kons. Scapinelli A. E. D. decidas unuvoĉe sendi dankleterojn al Scapinelli kaj Watzke. c) Ĉe la ĝenerala direkcio de la ŝtataj fervojoj oni promesis al li antaŭ nelonge, oficiale rekomendi la Esp.-lernadon al la fervojistaro. — D-ro Blaas: Petskribo al la fervoja landa direkcio por Tirol ĝis nun estas ne respondita. — Prof-ro Christanell: Afiŝoj propagandaj kaj menciantaj la societojn de la urbo estas pordaŭre fiksitaj en la stacidomo kaj aliloke en la urbo Salzburg. La stacio dungis interpretiston, kiu parolas krom anglan kaj francan ankaŭ Esperanton (s-ro Uglein). — Schade: Internacia eksperimento per komercistaj kursoj organizita de franca komitato. Partopreno rekomendita. — La kunsido je la 12, 15 horo estas interrompata por du horoj. Je la 2 20 remalfermas s-ro Bartel la kunsidon.

(Al IId. Landestraraj raportoj.) Raporto pri landestraro Wien (Smital): E.-Delegitaro de Wien laboras regule: ĉiumonate la unuan sabaton kunsido. Preskaŭ ĉiuj E.-societoj reprezentataj. Partoprenado en la kongrespreparaj laboroj. Dankesprimo por la kongresorganizo al Schade. Bonega propagandrezulto de la XVIa, bedaŭre deficito. La plej gravaj sukcesoj: 462 postenhavantoj de Komunumo Wien fondis E.-organizon (6 kursoj); la polica direkcio inaŭguris por la nuna sezono 11 kursojn; fondo de ŝtata ekzamenkomisiono preskaŭ certa antaŭ septembro 1925; granda movado en pacifistaj rondoj; Centro de U. E. P. L. en Wien, intereso ĉe oficialaj rondoj, ankaŭ Ligo de Nacioj. Fervorega laboro en kelkaj societoj: Freie esperantistische Arbeitsgemeinschaft. Novelektoj en E. D. de Wien: prez. Smital, sekr. Čech, kasisto Vasta. Komitato de fakuloj estiĝis necesa: d-ro E. Pfeffer konfidenciulo al la gazetistaro.

(Al III Specialaj raportoj.) Hirz, prezidanto de la Polica Esp.-Unuiĝo, Wien: La societo estas fondita en 1920. Dejorado dum la XVIa kaj foiro en Wien. Aranĝo de speciala Kongreso de Tutmonda Polica Esp-Asocio en septembro, kie la polica prezidanto de Aŭstrio Hans Schober persone prezidis kaj parolis Esperanto. 10 kursoj por policistoj, unu speciale por policaj juristoj kaj kuracistoj (en tiu 20 partoprenantoj). — Prof-ro Christanell: La Polica direkcio en Salzburg memstare aranĝis kurson. — Bartel: Same en Graz laŭ iniciato de la Esperanto-Societo. — Smital pri „Aŭstria Esperantisto“: Ke ĝi aperis ĝustatempe, estas taŭga interligilo, kiun ĉiuj Esperantistoj subtenu per varbado de anoncoj (1 paĝo kostas 220.000 K). — Paŭzo por kontrolo de la rajtigiloj

IVa. Post la paŭzo estas akceptata propono de d-ro Halbedl, debati antaŭ la elekto de la direktantaro pri ĝia sidloko. D-ro Halbedl proponas plue, ke principe la centro de A. E. D. estu ĉiujare alia E.-societo, kiu sola pagu ĉiujn kostojn. (Malakceptata ĉiuvoĉe) Propono de E. D. de Wien, ke la ĉefurbo Wien estu ree la centrejo, unuvoĉe estas akceptata.

IVb. Direktantaro-Novelekto. Bartel prelegas la proponon de Delegitaro Wien: Bartel-Graz, Čech-Wien, d-ro Halbedl-Graz, d-ro Jokl-Wien, Meisleder-Linz, Schade-Wien, Schamanek-Unter-Tullnerbach, Simon-Wien, Steiner-Korneuburg, Watzinger-Villach. — Ŝanĝoj: Bartel sciigas, ke Watzinger skribe rezignis reelekton. Rogler proponas enlistigon de Lidl. (Akceptita.) — Per aklamo A. E. D. elektas la proponitajn personojn. Aŭtomate estas anoj la landestroj: por Salzburg-Christanell, por Stirio-Hackl, por Tirolio-Blaas, por Wien-Smital. Post mallonga paŭzo la novelektita direktantaro proponas al A. E. D. jenajn prezidantar-kandidatojn: 1. prez. Schade-Wien, 2. prez. Bartel-Graz, 3. prez. Schamanek-Unter-Tullnerbach, ĝen. sekretario Steiner-Korneuburg, financa referanto Čech-Wien. (Unuanime akceptita.) — Bartel transdonas la gvidadon al la nova prezidanto s-ro Schade, kiu dankas nome de la elektitoj pro la fido, promesas energian laboron, parte laŭ ĝisnuna, parte laŭ nova maniero, kaj esprimas dankon al la eksprezidanto.

V. Pritrakto de laborprogramo. a) Propono d-ro Halbedl (publikigita en n-ro 2 de „A. E.“) pri laboroj en komercaj kaj trafikaj rondoj, per Radio, ĉe ministrejo por internaj aferoj, armeo, ruĝa kruco, ĝendarmaro k. t. p. estas akceptata kiel deziresprimo de A. E. D. D-ro Halbedl promesas verki la koncernajn petskribojn kaj sendi ilin al la prezidanto. b) Propono Lidl dezire-sprimas, ke A. E. D. pliigu publikan propagandon per afiŝoj en stratoj, stacioj k. s., precipe per la gazetaro. c) Smital alvokas al fina fondo de landestraroj en ĉiuj liglandoj, nepra subteno kaj regula kunlaborado al la prezidantaro. d) Bartel dezirespri-mas, ke A. E. D. sciigu la grupojn pri intencataj intervenoj, ĉar grupo eble povas grave helpi aŭ fari similan intervenon ĉe landaj aŭtoritatoj.

VI. Prienspeza decido. a) Propono de Esp.-Del. Wien: Kotizo por 1925 estu po delegitrajto (punkto 6 de la Regularo): 1 aŭ. ŝilingo (10.000 K). Sen debato unuvoĉe akceptita. b) Propono d-ro Christanell: La landestraroj kolektu la kotizojn de la societoj kaj kune sendu ilin al la financa referanto (adreso je la fino de la protokolo). (Akceptita) c) Kotizo por K. R. estas por la jaroj 1923/24 pagita de s-ro Schade persone (sumo 4 pfd. sterl.). Li rezignas je repago, kio estas danke akceptata. d) Propono por 1925: Duona aŭstria ŝilingo estas akceptata sen kontraŭdiro. (Por

konstati la laŭmembran pagdevon, Smital proponis registradon de ĉiuj organizitaj Esperantistoj, tiel, ke ĉiu Esperantisto estu „aktiva" membro en nur unu societo, sed reprenis la proponon.)

VII. Proponoj. a) Propono de Esp.-Del. Wien, elekti s-rojn kort. kons. kaj land. lernejinsp. Leopold Scheuch kaj Franz Wollmann konsilantoj de A. E. D. (Akceptita unuvoĉe.) b) Propono de Esp.-Del. Wien: La delegitoj instigu la grupojn al pagoj por forigo de la kongresa deficito (adreso je la fino). La landestraro por Stirio subtenas. (Akceptata.) c) Propono de Danubio, Wien: La ĵus en Wien instalita gazetara servo de Esp.-Del. Wien estu disvastigata je la tuta ŝtato Aŭstrio per koopto de ekster-viena gazetsperta samideano kaj korespondantaj membroj. (Akceptita unuanime.) Kooptito: d-ro Christanell. d) Propono de Danubio, Wien: Sendo de letero al „Ravag" (t.e. Radio-Verkehrs-A.-G.), Wien I, por instigi al regula disaŭdigo de Esperantlingvaĵoj; kaj dankletero al la iama sendstacio „Radio-Hekaphon" kaj al la redakcio de „Radiowelt" (t. e „Radio-mondo"). e) Deziresprimo de „A. E."-redaktoro Steiner, sendi al li listojn pri precizaj grupindikoj (nomo, adreso, membronombro, estraro) komencintaj kaj komencontaj kursoj por publikigo en la januara (!) numero; havigi al li kunlaborantojn kaj anoncojn. f) Post raporto de Schade, ke parto de la ekspozicia materialo okaze de la kongreslikvidaj laboroj estis ŝtelita, sed rehavigita, Bartel proponas laŭurban rondirĝon de la Wien-a ekspozicia materialo. (Principe akceptita.) g) Deziresprimo de d-ro Christanell: Aranĝi aŭstriajn naciajn kongresojn kun konferencoj de A. E. D. kaj fakaj. Grupo Salzburg aranĝos ĝin en 1925. h) S-ro Schade deziras, ke aperu en „A. E." klarigaj kaj rekomendaj notoj pri la komercistkursa eksperimento, pri organizo de la gazetservo, pri statistikaj bezonoj kaj pri la Teknika kaj Scienca Konferenco en Paris.

S-ro Bartel nome de la Esp.-Societoj por Stirio dankas al A. E. D. pro ilia invitsekvo. — Prez. Schade dankas pro la pena laborado kaj fidela helpo al ĉiuj kaj speciale al la Graz-anoj pro la afabla gastigo.

Fermo de la konferenco je la 18 horo.

Necesaj adresoj de funkciantoj:

Franz Josef Schade, Wien VI, Mollardgasse 55, II.
Karl Bartel, Graz, Schönaugasse 6, II.
Josef Schamanek, Unter-Tullnerbach I an der Westbahn.
Hugo Steiner, Bisamberg n-ro 248 bei Wien.
Raimund Ĉech, Wien IX/1, D' Orsaygasse 7, Tür 23.
D-ro Emil Pfeffer, Wien II/1, Postamt 34.
D-ro Franz Christanell, Salzburg-Parsch.
Oberst Karl Hackl, Graz, Radetzkystrasse n-ro 6, III.
D-ro Leo Blaas, Rattenberg, Tirol.
Walter Smital, Wien XXI/1, Am Spitz 14.
L.K.K. por la XVIa: Wien VI, Mollardgasse 55.

Graz, la 7. decembro 1924.

Karl Bartel, vicprezidanto. F. J. Schade, prezidanto.

Hugo Steiner, ĝen. sekretario.

La raporto pri la konferenco ne estus kompleta, se ne estus menciitaj la vere korĝojiga energio kaj persistemo de ĉiuj kunlaborintoj en la multhoraj streĉigaj, sed fruktodonaj kunsidoj, la ega afableco kaj helpemo de niaj Graz-aj gastigintoj. Precipe la ĝisnoktmeza tuja protokollaboro de s-anoj Bartel, Ĉech, Rogler kaj Smital ebligis la publikigon de la protokolo jam en ĉi tiu numero. Koregan dankon al ĉiuj!

Ĝen. sekretario.

„Libera Esperantista Laborkomunumo" aranĝos 15. decembro je la 8a en Kafejo Eckher, Wien VII, Lerchenfelderstrasse n-ro 23, Zamenhof-Festvesperon. Parolos s-roj prof-roj O. Simon kaj d-ro Jockl.

„Junularo" en kafejo „Molkereihof", Wien III, Radetzkystrasse 23, je ½8 aranĝos paroladojn 11. decembro s-ro Kurt Eder (rakontoj), 18. decembro Zamenhof-Memorkunveno (parolado de s-ro Mildwurf, deklamo), 8 januaro f-ino Morgenstern (prelego).

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien XXI, Am Spitz 14.

RAPORTO pri la 46. kunsido 29. novembro 1924 Tagordo: 1. Kontrolo de delegitrajtoj. 2. Novelektoj. 3. A. E. D.-Konferenco en Graz. 4. Diversaĵoj. Ĉeestis 26 delegitoj. Novelektita estraro: prezidanto s-ro Walter Smital, sekretario s-ro Rajm. A. Čech, kasisto s-ro Franz Vasta. Oni elektis s-ron d-ron Emil Pfeffer reprezentanto de E. D. W. ĉe la gazetaro.

S-ro Smital transprenis kiel reprezentonto en A. E. D.-Konferenco en Graz la proponon, ke la centro de A. E. D. restu en Wien. Raportoj: Alvenis dankletero de L. K. K. por la XVIa pro la donaco de unu miliono flanke de la „Delegitaro". Novaj kursoj en Gramat-Neusiedl kaj Mariental. Laŭtlego de letero pri eksiĝo de la „Laboristaj Esperanto-societoj" el la delegitaro. Rilate la aferon Siebenschein

alvenis jam sep respondoj. Al policprezidanto Schober, tre favora al nia movado, estis forsendita gratulletero. S-ro F r e y raportis pri grandaj sukcesoj ĉe la urbaj postenhavantoj kaj radio, s-ro S t e i n e r pri du kursoj en la liglanda edukejo (t. e. Bundeserziehungsanstalt) en Traiskirchen gvidataj de li.

Tutmonda Esperantista Ligo Fervojista

Centro: Bisamberg n-ro 248 apud Wien.

CENTJARA EVOLUO DE LA „AŬSTRIAJ FERVOJOJ“

(Daŭrigo kaj fino.)

La 17. aŭgusto 1867 estis finkonstruata de „Südbahngesellschaft“ laŭ projektoj de konstrudirektoro E t z e l la „Brennerbahn“. Ĝi montris mirindan progreson de la konstrumaniero por transmontarfervojoj en Aŭstrio tiel grandege evoluiĝinta.

Glorfolion de la fervojhistorio Aŭstria reprezentas fine la bravega konstruo de la „Arlbergbahn“, komencita en la oka jardeko de la pasinta jarcento. Per ĝia finkonstruo estis kreita la dua necesega linio aŭstria, sur kiu nuntempe krom la linio Linz—Wels—Passau la internacia vojaĝinterkomuniko de Eŭropo interligas la okcidentajn kun la orientaj landoj.

Ĉiam pli densa fariĝis tiamaniere la fervojaro ampleksanta nian alplandaron. Ĝi montris sian plej altan teknikan perfektiĝon en la novaj de d-ro inĝ. Karl W u r m b konstruitaj gravaj alpfervojoj.

Kiel korelativo al „Semmeringbahn“ atestas „Tauernbahn“ la plej modernan staton de la tekniko montarfervoja.

„Tauernbahn“ veturigas el stacio Schwarzach-St. Veit supren tra la valo de Gastein, traboras poste Hohe Tauern (tunelo 8520 m longa) kaj venigas tiam Spittal-on. Rimarkindaj estas multaj viaduktoj, inter ili tiu trans la valeto de Zwenberg, kolosa objekto 156 m longa kaj 68 m alta.

Parto de Schwarzach-St Veit—Badgastein estas ekuzita septembre 1905, la dua ĝis Böckstein 7 julio 1909.

Plue du linioj K a r a w a n k e n b a h n (Klagenfurt–Rosenbach–Assling. 43 km) kaj W o c h e i n e r b a h n (Assling—Görz—Triest, 145 km) estis konstruitaj de la ŝtato, kiuj peru malpli longan ol ĝistiama interligon de Mezeŭropo kaj de la internaj partoj de Aŭstrio per fervojo kun Adriatika Maro, precipe kun Trieste, la ĉefhaveno de la tiama imperio (ekuzita 1906).

Multaj artkonstruaĵoj — viaduktoj (la plej granda Rosenbach-Viadukt 239 m longa), tuneloj (Wocheinertunnel, 6339 m longa, kostis 19·6 milionojn da kronoj; Karawankentunnel, 7976 m longa, kostis 37 milionojn da kronoj k a.), pontoj (trans Isonzo, 242 m longa. La internaj spacoj de la kvar ĉefaj aperturoj de tiu interesa objekto estas ĝis 40 m. La granda ponto de Salcano, la plej granda el la ekzistantaj ŝtonaj pontoj por fervojo. Tie la relaro transversas la valon 36 m super la nivelo de Isonzo per 220 m longa ponto ŝtona, kies meza aperturo estas nur unu impona arkaĵo kun interna spaco de 85 m; k. a.) k. t. p. devis esti konstruataj.

Impona faro estas la unua en Aŭstrio elektre funkciigata Mariazellerbahn, kiu de St Pölten (linio Wien—Passau) trans Mariazell (mondkonata pilgrimejo) al Gusswerk peras al la vojaĝantoj la ĝuon de la grandiozaj naturbelecoj de tiu ĉi regiono.

Je siaj alpfervojoj Aŭstrio posedas majstrokonstruaĵojn de la inĝenierarto.

Kun la ĉiama plikonstruo de la relvojo ankaŭ la senĉesa plibonigo de la ilaro porfunkciiga de niaj aŭstriaj fervojoj estis sampaŝanta.

Veturiloj, modeloj kaj bildoj en nia „Historia muzeo pri aŭstriaj fervojoj“ atestas tion plej bone.

La modelo de jam pratempa sesrada nordfervojlokomotivo el la jaro 1837, ankoraŭ en Anglujo konstruita, apud tiu de transmontarlokomotivo por rapidtrajnoj konstruata 1905 en Aŭstrio montras certe plej konkrete la diferencon

inter iam kaj nun. La plej novaj lokomotivtipoj de la fervojaro „Österreichische Bundesbahnen“ karakterizas la perfektecon de moderna lokomotivtekniko.

Sed la estontecon de nia aŭstria fervojtrafiko simbolas la modelo de elektra rapidlokomotivo pormontara por „Arlbergbahn“, finkonstruita 1923 de Österreichische Brown-Boveri-Werke A. G. en Wien.

De la funkciigo per ĉevaloj ĝis la vaporlokomotivo estis longa vojo, sur kiu la aŭstriaj fervojoj neniam restis malantaŭ la eksterlando.

La estonto de Aŭstrio kaj ankaŭ de niaj fervojoj estas tre interligita kun la utiligo de niaj akvofortoj kaj kun la elektrigo de niaj fervojoj.

Sur la por elektrigo destinitaj linioj de niaj alpfervojoj jam funkcias inter Innsbruck kaj Landeck elektre movataj trajnoj por vojaĝantoj kaj ŝarĝoj kaj baldaŭ oni funkciigos sur la relaro Landeck—Bludenz la interkomunikigon per elektra energio tutamplekse.

Baldaŭ la elektrigaj laboroj sur la Salzkammergut-linio Stainach-Irdning—Attnang-Puchheim estos finitaj kaj la elektra funkciado komencos.

Turismo kaj fervojo estas ne disigeble interligitaj, estas kvazaŭ reciproke kaŭzo kaj efiko.

Ĝuste komprenante la gravecon de turismo por la fervojoj la iama imp. aŭstria fervojministerio eldonis du belegajn ilustritajn gvidlibrojn en germana kaj Esperanta lingvoj.

Preskaŭ cent jaroj pasis de kiam la unua relvojo Eŭropa estis konstruata en nia aŭstria Donaŭlando. Certe estas ĝojiga fakto, ke „Österreichische Bundesbahnen“ per elektrigo de siaj pejzaĝe belegaj kaj tial por la turismo precipe valoraj linioj antaŭen marŝas al laborriĉa, sed sukceson promesanta estonto.

H. Steiner, Bisamberg.

Floridsdorfer Stationsbüttel
Im Jahre 1838

Stacia dometo en Floridsdorf 1838.

Universala Esperantista Pacifista Ligo

Centro: Wien I, Hofburg (Aŭstrio).

RENKONTE AL LA UNUIĜINTAJ ŜTATOJ DE EŬROPO.

De generalo *Verraux*, Paris.

De semajnoj la vortoj „senarmigo, sekurecpaktoj“ rondflugas tra la aero. Ĉu ni efektive estas enirantaj fazon de kvietiĝo? Ĉu la nova protokolo de la Ligo de Nacioj estos pli efika ol la antaŭaj?

Certe la verko, al kiu kunlaboris tiom da bona volo, estas progreso kaj tamen ĉi tiu progreso ŝajnas al mi ankoraŭ tre bagatela, tre timema kaj neperfekta.

Parte tion kaŭzas laŭ mia opinio la ekstera formo, kiun elektis la Ligo de Nacioj, por starigi la daŭran pacon sur forta fundamento. Tiom longe, kiom la nacioj nur formas societon, ili estos submetataj al ĉiuj konfliktoj, per kiuj ja suferas ĉiu ajn societo.

Ŝajnas al mi, ke ĉiuj diskutoj en Genève estis nur jurecaj kaj ke la animo, volo de la popolo, nenie havis okazon, esprimi sin. Havis tro multe da influo la naciismo, tro malmulte da humaneco. Jam de longe mi deziras anstataŭ la Ligo de la Nacioj „unuiĝon de la nacioj“. Unue la „Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo“ poste la „Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Mondo“.

„Kion vi pensas?“ oni demandos. „Ĉu oni povas per plumstreko neniigi tiom teruregan militon, kaŭzintan tiom da dezertigoj, ekkaptintan ĉiujn popolojn de la Norda ĝis la Nigra Maro? La vundoj estas ankoraŭ tro freŝaj, la mal-

amikoj de hieraŭ ne povas jam eniri unuiĝon."

Kaj tamen tiaj aferoj jam okazis: kiam la Unuiĝintaj Ŝtatoj post kvinjara, furiozega milito inter la mezaj kaj sudaj ŝtatoj fondis Usonon. Tio fariĝis antaŭ ĉirkaŭ 60 jaroj. Kaj tamen ĉi tiuj popoloj pro la tre malsamaj rasoj multe pli diferenciĝas ol la nunaj nacioj de Eŭropo.

Parolante pri la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo ni tute ne intencas, kunfandi ĉiujn naciojn de Eŭropo en unu poto, preni de ili la individuan karakteron, submeti ilin al unuformaj leĝoj interpretotaj de malgrandanimaj burokratoj. Ni nur projektas unuigon sur plej larga fundamento, kiu evitigas laŭeble ĉiujn konfliktojn inter la anoj, permesas liberan interkomercon, kies rilatoj neniel estas malutilataj per kapricaĵoj, kiu havas unuecan monon kaj kies originalecoj kaj apartecoj estos kompensataj per reciprokeco.

Tio ne signifas rezignon je la patrujo, kiun ankaŭ mi nepre rifuzus. Ĉu eble la landoj unuigitaj en Usono perdis sian individuan karakteron? Ĉu ne ĉiuj grandpotencoj naskiĝis el malgrandaj unuiĝoj? Iam grupiĝis ĉirkaŭ la monaĥejaj kolonioj la vilaĝoj, tiuj sin unuigis en pli grandaj komunumoj kaj tiuj en landoj.

Tiel estiĝis Francujo, tiel Germanlando. Ĉu ne ankaŭ ni estis, antaŭ ol ni fariĝis Francoj kaj Germanoj, anoj de pli malgranda ŝtato: Provencalio aŭ Pikardio, Vestfalio aŭ Silezio? Ĉar estas natura leĝo, ke la granda evoluiĝas el la malgranda, ĉar plue estas leĝo, ke la moderna homaro konstante pli federacias sian energion en ekonomia, industria kaj spirita fakoj, estas logike, akceli ankaŭ la politikan kaj ekonomian federacion, por ke la Oriento, la Okcidento, la Nordo kaj la Sudo ekzercu interŝanĝojn en Eŭropo, kiu, kiom ajn aĝa ĝi estas, ne volas morti.

Ni devas kompreni, ke, se iutage la popoloj de Eŭropo denove ekkaptos ĉe la gorĝo unuj la aliajn, ili pereos.

Se ne efektiviĝos vera unuiĝo, oni devos timi malgraŭ ĉiuj garantioj kaj ĉiuj antaŭgardaj aranĝoj, eksplodon de nova milito, se la popoloj ne ĉesos, persekuti unu la alian per malamo, lasi sin konduki de politikaj partioj, obei al ambiciaj registaroj, sin fordoni al la eraroj de diplomatoj, al la interesoj de strategoj, al la problemeco de kontraktoj.

Eŭropo sekve de tia animstato baldaŭ denove estos batalkampo.

Estas tasko de la popoloj mem, interkompreniĝi por igi senefikaj la intrigantojn, la ambiciulojn, la malverajn patriotojn kaj aventuristojn, kiuj malhelpas la interkompreniĝon. Neestante malbona patrioto oni tamen rajtas deziri, ke la propra lando fariĝu feliĉa per la paco anstataŭ falegi en militon, indiferente ĉu tiu finiĝos per venko aŭ malvenko.

Utopio! oni alvokas al ni. Vi jam parolis pacajn vortojn antaŭ la milito, volis doni la manon al la najbaro kaj poste vi atakis unu la alian! Se oni nur ordonas, vi tuj mortbatos unu la alian. Konsentite. Sed oni lernu el la eraroj. Ni ja akiris terurajn spertojn. De nun neniu plu havas la senkulpigeblon, ke li ne sciis, kion signifas milito.

Ni kunagu, por malhelpi la krimon. Spite al ĉiuj skeptikuloj kaj mokemuloj ni iru nian vojon, obstine, ne ŝancelante!

El „Die Menschheit" (t. e. La Homaro)
tradukis *d-ro Orthal*, Nürnberg

REVO DE LA HOMARO.

Orig. verk. de *Josef Weiniger*, Wien.

Antaŭ du jarmiloj profetis laŭvorte profeto Isajo. Kiam ĉiuj homoj havos saman religion kaj parolos unuecan puran lingvon, kiam ĉiuj glavoj transformiĝos al laboriloj — tiam venos Mesio!

„Ĉu efektive li venos?" demandas la homaro.

Du jarmiloj estas pasintaj depost Isajo kaj ĉiam ankoraŭ atendas la homaro Mesion.

Nelonge post Isajo vivis la fondinto de l' kristana religio Kristo; liaj partianoj nomis lin Mesio, ĉar ili opiniis,

ke post mallonga tempo ĉiuj popoloj de la tutmondo akceptos la kristanan religion, kaj sekve de tio nenia malpaco, nenia milito plu estos. Sed ili eraris; antaŭ nelonga tempo en mondmilito, preskaŭ du miljarojn poste interbatalis furioze la kristanaj popoloj! Iu pli la scienco disvastiĝis inter la homoj, des pli la religio perdis sian valoron. La homoj ekkonis, ke la religio ne estas scienco, nur sciencanstataŭajo.

Anstataŭaĵo de la religio aperis la socialismo, kies ĉeffundamento estas forigo de l' militismo kaj jam imprese komencis la efektiviĝo. Nur la interkompreniĝo de la popoloj ankoraŭ mankis. La solvo troviĝas en la lingvo Esperanto. Kaj Mesio estas ekmarŝanta!

Jam sonas tra ĉiuj landoj mallaŭte, sed tamen aŭdeble: „Neniam plu militon!" kaj kiam la vera socialismo kune kun Esperanto konkiros la terglobon, tiam realiĝos la vortoj de la profeto Isajo pri Mesio.

RIMARKINDAJ PRESAĴOJ.

Tri lirikoj de William Shakespeare. Vortoj tradukitaj de Archibald John Ashley, muziko de Matthew Francis Coates; eldonita de A. J. Ashley, Farnley Tyas apud Huddersfield (Anglujo), 1924. Prezo: 1 šil. 6 p., per poŝto 1 šil. 7 p.

El la „lando sen muziko" venis tiu kajero. Ĝi pruvas, ke tiu nomo uzata en Wien por Anglujo estas pravigebla nur, se oni unuflankece komparas la germanan muzikproduktaron el la tempo de la Wien-aj klasikuloj kaj de l' germanregnaj romantikuloj kun la samtempa angla. Nuntempe oni ofte aŭdas tie ĉi modernan anglan muzikon kaj anglaj muzikartistoj estas volonte akceptataj. La verko meritas esti studata, ĉar ĝi šajnas bone komprenigi la sentenhavon de tri tekstoj de Skakespeare kaj per tio anglan animvivon.

1. Madrigalo el „Measure for Measure" (t. e. Mezuron laŭ mezuro), 4. akto, 1. sceno. La kanto de la knabo antaŭ Mariana enkondukas la 4. akton, esprimante šian animstaton: Ankoraŭ ŝi amegas Angelon, kiu ne plu pensas pri ŝi: ŝi malesperiĝis. Simple esprimas tion la kanto, kiu verŝajne bone sonus al liuto.

2. Fidele el „Cymbeline", 4. akto, 2. sceno. Tiu dueto por baritono kaj baso estas malnovstila kiel la du aliaj kantoj, sed certe la plej impresa inter ili: majstropoemo. La simplanimaj filoj de l' naturo Guiderius (baso) kaj Arviragus (baritono) funebras pro la (šajna) morto de Imogen en vesperkrepuska arbaro. Malgraŭ klasika voĉgvidado multaj dramatikaj nuancoj profunde sentataj. La orelon de Wien-ano nur ĝenas iomete la kvintakta interparteto „Moderate" tro memoriganta niajn valskutimojn.

3. Carpe diem, la kanto de l' kortega amuzigisto-frenezulo el „Twelfth Night" (tio estas La dekdua nokto) prezentas originalecan esprimon de šanceliĝo inter ritma vigleco kaj melankolia meditemo.

Walter Smital, Wien.

•

LEGEMULOJ! Certe ĉiu inter vi ĝojos pri la eblo, havigi al si bonegajn librojn malmultekoste. Uzu la okazon de kristnasko kaj mendu en nia nova aŭstria Esperantolibrejo. Atentu la aldonfolion kaj anonco malsupre!

ANONCOJ 3liniaj anonc 7000 aŭ. K. Reklamo 1/1 pĝ. = 250 mil., 1/2 = 130 mil., 1/4 = 70 mil., 1/8 = 40 mil. aŭ. K; je 3foja enpreso 5% rabato.

Multobligoj



kaj aliaj preslaboroj,

precipe Esperantlingvaj,

bonkvalite,
malmultekoste
kaj rapide
estas liverablaj

ĉe »EPOKO«, Wien VI, Mollardgasse 55-7.

Telefono: 10-2-30
10-3-90, 10-7-67

Telegraf-Adreso:
L o f a g - W i e n

Wiener Lokomotiv-Fabriks-A.-G.
Wien-Floridsdorf

Longe bonkonata maŝinfabrikejo.

Vaporlokomotivoj
je ĉiuj grandecoj kaj konstrumanieroj por ĉiuj reldistancoj.

Senfajraj lokomotivoj, dentradlokomotivoj, elektraj lokomotivoj.

Moderna kaldronkonstruado.

Kaldronoj kun akvotuboj por alta tensio kaj kun grandaj akvujoj je ĉiuj specoj, malgrandkaldronoj, vapor-trovarmigiloj, hejtkradoj, kaldronarmaturoj, tubaroj por altaj tensioj.

Vapororulbenigiloj por stratoj
laŭ plejbonpruviĝinta konstrumaniero.

Forĝitaĵoj Ferfandaĵoj

»CÆCILIA«

Österreichische Orgelbau
·A·G·

Fabrikado de
preĝej- kaj salonorgenoj, pianoj
harmoniumoj kaj
violonoj

Fabrikejoj:

Salzburg-Parsch, Gaisbergstrasse
Nr. 13 a

Telegramadreso: Cäciliag Salzburg
Telefono: 302, Salzburg

Artistaj ĉefoj:

Akademiprofesoro V. Goller, Kloster-
neuburg, kaj katedralmuzikestro
Franz X. Gruber, Salzburg

ʃʃ

La teknika gvidado estas en la manoj
de famaj fakuloj

Libroj por Kristnasko.

VERKOJ DE D-RO ZAMENHOF:

Fundamenta Krestomatio	60.000·—
Fabeloj de Andersen	38.000·—
La Rabeno de Baĥara (Heine) kaj La Gimnaziano (Ŝalom-Alajĥem)	25.000·—
La Virineto de Maro (Andersen)	15.000.—

ORIGINALA ESPERANTO-LITERATURO:

Baghy, Preter la Vivo	15.000·—
Forge, Abismoj	46.700·—
Forge, Saltego trans jarmiloj	76.500·—
Luyken, Stranga heredaĵo	68.000·—
Luyken, Pro Iŝtar	93.500·—

INTERNACIA MONDLITERATURO:

Vol. I. Goethe: Hermano kaj Doroteo. Vol. II. Niemojewski: Legendoj. Vol. III. Turgenev: Elektitaj Noveloj. Vol. IV. Raabe: La nigra galero. Vol. V. Hildebrand: El la „Camera Obscura". Vol. VI. Irving: El la skizlibro. Vol. VII. Chamisso: Petro Schlemihl. Vol. VIII. Stamatov: Rakontoj. Vol. IX. Ŝalom-Alajĥem: Hebreaj Rakontoj. Vol. X. Puskin: Tri Noveloj. Vol. XI/XII. Arišima: Deklaracio. Vol. XIII. Poe: Ses Noveloj. Vol. XIV. Balzac: La firmao de la kato, kiu pilkludas. Vol. XV. Dovoŝevič: Orientaj Fabeloj.

Ĉiu volumo, bele kartonita . . . . . 20.400·—

TRADUKOJ EL DIVERSAJ AŬTOROJ:

En Svislando (trad. E. Rano)	45.000·—
Hauff, La kantistino	14.000·—
Hebbel, Gyges kaj lia ringo	60.000·—
Lessing, Natan la saĝulo	36.000·—
Limbourg-Brouwer, Akbar	54.000·—
Hofmann, La Struvelpetro	25.000·—
Petõfi, Johano la brava	15.000·—
Raimund, La Malŝparulo	30.000·—
Seidel, Vintro-fabeloj	25.000·—
Wiseman, Fabiola	90.000·—

Prezindikoj en aŭstriaj kronoj. Livero okazos nur post antaŭa pago. Sendkostoj **ne** estas alkalkulataj.

Esperanto-Librejo Emil Schade

Wien, VI., Mollardgasse 55

Postsparkassen-Konto 34860 **Geschäftszeit von 9—19 Uhr**

Eldonanto: Esperanto Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gstaltner & Co., G. m. b. H., Korneuburg, Kirchengasse 3.